AVENO #49 - **Verdaj Partioj & Esperanto - 2023**

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

Se vi estas membro de verda movado (en senco de Verdaj Partioj) kaj ghis nun ne estas membro de AVE bonvolu sendi ret-mesaghon al la sekretario de AVE: AVE@verduloj.org
Gravas scii kiom ni estas.

= = =

2023-10-17 Pollando - post la elekto - Gratulon al Zieloni - aktualaj situacio kaj disputoj
Feliĉe ĉifoje multe pli - 72% - iris voĉdoni. PiS (35,4%) ne plu povas regi sole, kondiĉe ke la alternativa koalicio sukcesas trovi interkonsenton.

La Civitana Koalicio / Koalicja Obywatelska, KO / ricevis 30,7 % , kaj jam antaŭ montriĝis ebla koalicio kun maldekstruloj kaj 3a Vojo.

La Verda Partio, Zieloni, estas parto de ĉi-tiu koalicio, tial ne aperis kiel individua partio. **Małgorzata Tracz,** MP, estis je la 2a loko de la listo.

https://europeangreens.eu/content/poland-shows-power-peoples-vote%C2%A0

- -

Antaŭ la elekto aperis dokumenta filmo pri diversaj opoziciuloj en Pollando - montras ankaŭ voĉoj de PiS-anoj. PiS regas ek de 10 jaroj. Ĉar tiu ne respektas bazajn liberecojn kaj jur-ŝtatajn regulojn; sed per leĝoj reduktas individuajn rajtojn. Temas pri rifuĝintoj, kiuj estas kvazaŭ senditaj de Belarus. Simile kiel sur la maroj ankaŭ tie estas civitanoj kiuj helpas al la rifuĝintoj finfine atingi sekurecon.

La pozicion de EU prezentas Daniel Freund (MEP de Verduloj/Regionalistoj).

La informoj estas aŭdebla aŭ parte legeblaj en 6 lingvoj (de, en, es, fr, it, pl):

https://www.arte.tv/de/videos/109845-000-A/polen-an-der-grenze/

- - -

2023-09-19 mortis Per Gahrton en Svedio
Se mi bone memoras vi konis Per Gahrton, kiu estis unu el la fondintoj de nia verda partio, Miljöpartiet. Hodiaú li mortis, 80-jara.
(dankon al Gunnar Skövde por la informo)
Libera Folio skribis 2007:
*„Laŭ li taŭgaj alternativoj por komuna EU-lingvo estus la franca, latino, aŭ Esperanto. Esperanton aŭ latinon laŭ li eblus enkonduki ene de unu-du generacioj, la francan multe pli rapide. „*
Jen la ligilo, serĉu simple Gahrton, tie vi ankaŭ trovas la salutvortojn de sveda ministrino por kulturo kaj sporto, Amanda Lind, okaze de la UK en Lahti 2017:
http://www.verduloj.org/welcome.htm

- - -

2023-07 Uzbekio - nova prezidento; kaj aktiva ekologi-favora partio

Post la morto de Islam Karimov dum 1 jaro regis Schwkat Mirsijojew de la liberaldemokrata partio. Je la oficialaj elektoj en Julio li ricevis 87%. La 3 aliaj kandidatoj ĉiuj simile je 4%; inter ili Abduschukur Khamsajew, de la Ekologia Partio. Antaŭ 26 jaroj mi verkis raporton pri mia vizito en Uzbekio, en Taŝkent, Samarkand kaj aparte proksime de la Aral-Maro.
http://www.verduloj.org/aral.htm

= =

2023-05-17 **Zoom-interparolo kun francaj kaj aliaj tutmondaj verduloj**
je la 17a de Majo 20:30 (Pariza Somera Tempo) ni zumis (ZOOM-is) kun membroj de la Esperanto-Komisiono de EELV (Ekologio-Europo La Verduloj, la franca verda partio). Je la sekva fojo mi informos vin pri la temo, kaj maniero partopreni.

- -

2023-05 **Gratulojn por Verdaj Partioj en Anglio & Kimrio, kaj en Turkio**
Okaze de la lastaj parlamentaj bataladoj ili gajnis multajn seĝojn.

**...**

**Green Party's Crucial Role in the Opposition**

Our member party, Yeşil Sol, has played a crucial role as one of the main components of the opposition. They have steadfastly stood for minority rights, democracy, and social justice, representing the voices of those marginalised under Erdoğan's regime.

Despite the very difficult conditions for conducting an election campaign, 61 candidates from Yeşil Sol were elected to Turkey's Grand National Assembly on 14 May. Their voice in Turkey is more important than ever.

Karaj AVE-anoj en Germanio,

tiuj de vi kiuj estas membroj de la Verda Partio dum la sekvaj monatoj partoprenos la diskutojn por la sekva balotado al nova EU Parlamento.

En NRW je 24a okazos la unua virtuala kunveno kiam prezentos sin la/kelkaj kandidatoj.

Mi ŝatus demandi ilin ĉu ili pretus diskuti kiel EP-anoj la rolon de Esperanto en EU.

Jam estas bone ke Erasmus+ subtenis kelkajn Esperanto-agadojn;

Krome Esperanto troviĝas el inter la 16 lingvoj en kiuj la Tutmonda Charto de la Verduloj - videbla tie*:

https://globalgreens.org/about/charter/

Okaze de ilia kongreso dum Junio en Incheon, niaj koreaj gesamideanoj prezentos Esperanton kadre de foirejo de partneraj organizaĵoj. Poste ni tradukos novigitan ĉarton.

*) ni tradukis similajn dokumentojn ankaŭ por Europeangreens.org, sed dum la reorganizo de ĝia retejo, ili (plejparte) elfalis ?

Krome, en Francio ekzistas formala Esperanto-Komisiono kadre de EELV - tia formala kunlaboro kadre de la partio en Germanio (momente) ne eblas, ĉar ni estas tro malmultaj. Dum mi loĝis en Ba-Wü, mi estis membro de LAG Europa; sed sole ne povas atingi pli ol informo ke Esperanto ekzistas.

Atentu: je 23a - 26a de Novembro okazos BDK en Karlsruhe, kie temos pri Europo, ĉar en 2024 okazos la sekva baloto por la EP (post 2019).
2009 ni sukcesis enmeti la temon lingvoj, eĉ mencion de Esperanto (titolo de la Europa-Programm. (mit Wums ! für ein besseres Europa - p. 135).

Estus bone prezenti similan frazon por la nova EU-Programo. Se iu el vi pretas partopreni (ĉu tie kiel delegito, ĉu je Esperanto-informtablo) ni povas fari ion.

Eble ni povas paroli kun vi pri tio en Braunschweig aŭ en Torino; en Torino okazos kunveno de AVE.

En Braunschweig mi partoprenos la kunvenon de EDE, kiuj ja estas nia konkurenco okaze de la EP-balotado. Se ili estus tiom sukcesaj kiel en Francio, la Verda Partio povus interesiĝi pli forte por Esperanto.

Bondezirojn, amike,
Manfred
--- fino